

## ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO  
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ  
REDAKTORZY

PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI  
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.*Ŝtono sur nia vojo.*

Ekzistas nenia dubo, ke malfacila disvastigado de Esperanto en nia lando estas kaŭzita de multaj antaŭjuĝoj, miskonprenoj ĉe vasta publiko kaj manko de konforma interesiĝo dum regas krizaj kondiĉoj de ekzistado, kiuj forrabas de l' homoj emon al plivastigo de intelektaj horizontoj.

Eble iom same estas en aliaj landoj, sed ĉe ni precipe. Ke multaj laboruloj en ĉiutaga penado kaj necerteco pri l' vivo ne trovas forton suprenlevi sian intelekton al pli vastaj homaraj celoj — ne estas mirinde. Sed ne pri ili mi volas skribi. Mia penso turnas sin al instruistaro, kiu — ŝajnus — devus esti escepto en amaso da aliaj inteligentuloj.

Esperanto kun sia relative — al aliaj projektoj de mondlingvo — longdaŭra ekzistado kun sia nedubebla — kvankam malrapida progreso, estas „salo en okuloj“ de niaj lingvoinstruistoj, kiuj subkonscie vidas en ĝi seriozan danĝeron por ilia profesia laboro vivtena, samkiel ekzemple havenportistoj rigardas elektrolevilon. Nu, ili tial penas mortigi ĝin ne nur per sia malŝato kaj manko de ekinteresiĝo, sed eĉ farante malutilon al estiĝo de favoro en rondo de ili instruataj.

Ne estu do al vi, samideanoj, sekreto, ke tie sur lerneja benko naskiĝas malĝusta kompreno de nia lingvo, inokulata al nia junularo per mokaj kaj estiĝantaj malŝaton paroloj de instruistoj. Eksciu, ke ekzemple: Esperanton ili ne konsideras inda je nomo de lingvo, ĉar ĝi e-

stas miksaĵo, kriplaĵo de diversaj aliaj lingvoj, ili eĉ kondamnas ĝin kiel jam falintan post komenca sukceso, ĉar tion ili adire faris scienculoj; laŭ ili ĝia lasta malsukceso en Germanujo estas ŝuldata al romana deveno. Post tiaj paroloj, aŭdigita de instruisto en aŭtoritata tono, ne estas mirige, ke senkritika lernanto elportas impreson, ke ĝi estas neprikupiĝinda ridindaĵo, kaj nia lingvo estas en lia opinio destinita al morto. Tiu ĉi opinio restas jam longe ĝis okazo de ekkontakto kun esperantisto, kiu havas tiam multe pli grandan malfacilon konverti lin, ĉar li trovas antaŭmalinklinon, kiun li devas venki.

Sentakto de tia „instruado“ estas ja nedubebla, ĉar jen, laŭ antaŭ kelkaj jaroj anoncita dekreto de Ministerio de Klerigado, Esperanto estis allasita al eksterprograma instruado kiel nedevida lernobjekto. En tiu ĉi dekreto la Ministerio donis ateston, ke ĝi samgrade taksas Esperanton, kiel aliajn nedevide instruatajn lingvojn, do ne kiel bagatelaĵon. Konsekvence — la instruisto ne rajtas ekster leciono kaj tiom pli dum ĝi, kiel en tempo de oficado, kritiki kaj subfosi aŭtoritaton de propra Ministerio, aprobanta Esperanton, per ĝia bagateligado. Estas same kvazaŭ sejmdeputito propagandus kontraŭ ŝtato.

Se do estas tiel, ni devas kontraŭstari tian sintenon de instruistoj ne nur kiel esperantistoj, sed ankaŭ kaj unue kiel civitanoj.

Ĉi tie estas sendube la kerno de malbono, se ne tuta, do almenaŭ la duono.

Ĉi tiu iam trudita de instruisto opinio pri Esperanto estas ŝtono, kiun ni devas forigi. Mi bazas min ne sur suspekto, sed sur kontrolitaj faktoj. Al instruisto oni ofte kredas senkontrolite kaj eĉ poste oni ne kontrolas lian bazhavecon. Forigi do tiun ĉi malsanon — signifas pliglatigi vojon por nia propagando.

De tia elito de inteligentularo, kia estas instruistoj, ni, verdstelanoj, rajtas postuli almenaŭ tion, ke ĝi ne traktu la aferon sen pliproksima konatiĝo kun ĝi. Kaj almenaŭ, se iu el ili ne interesiĝas pri la problemo aŭ ne havas tempon por sufiĉa konatiĝo — tiam li ne trudu sian vidpunkton al lernantaro — tio ne estas temo por la leciono.

Krome oni sciu, ke instruistoj de naciaj lingvoj aŭ de latino ne estas ordinaruloj — ili sentas sin ties pioniroj, do kvankam eble konsciante pri siaj konvenaj instruefikoj kaj ties praktikeblo — ili bagateligas nian lingvon, kiel artan.

Tuŝinte tiun doloran demandon mi volas turni atenton de koncernaj esperantaj societoj kaj institucioj al interesiĝo, kaj proponas ekkomenci batalon por utilo de nia movado. Kiel ĝiaj rimedoj mi proponas:

1) Turni sin al Ministerio de Klerigado kun peto pri rememorigo al ĉiuj lernejestraroj pri jama dekreto, koncernanta nedevigan instruadon de nia lingvo. Ekproponu al ĝi fari enketon pri rezultoj de eksterprograma instruado de aliaj lingvoj. Turnu atenton al tio, ke instruistoj ofte dum leciono kontraŭbatalas Esperanton spite al favoreco de Ministerio, esprimita en la dekreto, kaj

petu pri ĉesigo de tia stato. Atentigu pri rezultoj de Viena konferenco.

2) Turni sin al lernejoj kuratoroj pri permeso: a) aranĝi debatkunvenojn pri Esperanto por lingvoinstruistoj, por ke ili konatiĝu kun la problemo pli proksime, b) aranĝi informdebatajn prelegojn por ĝelernantoj de lasta klaso, por ke ili ekkonatiĝu kun la problemo ankoraŭ antaŭ forlaso de lernejo (poste ili restos por ni nekapteblaj).

3) Turni sin al instruistaj organizaĵoj kun peto influi la membrojn pere de faka gazetaro kaj de eventualaj prelegoj, ke ili konatiĝu kun la problemo pli proksime kaj ne kontraŭbatalu Esperanton dum lecionoj.

Mi forte esperas, ke tiu konkorda kamstreĉita laboro povas doni pli grandan efikon, ol multaj ne tro vizitataj, multlaboron postulantaj kursoj, kies rezultoj ne ĉiam estas konvengrada al klopodoj. Ni prilaboru la junularon antaŭe per maniero de mi proponita, do prepare sur informa kaj edifa grundo — poste ni havos el ĝi sufiĉan materialon por kursoj — kaj se ne en dezirata nombro, do almenaŭ estontaj simpatiantoj subtenantoj. Kursanoj el tiu materialo restos poste fidelaj al nia movado kaj alte portos nian verdan standardon.

Sed, se ni nur instruados — kaj ne rigardos observe tion, kion intencas fari niaj kvazaŭamikoj ni povos perdi jam gajnitajn poziciojn.

Ŝajnas al mi, ke en dirita direkto ankoraŭ nenio estis farita.

Mi esperas, ke koncernaj aŭtoritatoj ne permesos, ke tiu ĉi problemo restu nesolvita.

ing. M. Chmieliński  
Łódź.

## PRI LABORPROGRAMO.

### KIEL AGI POR EFIKE PROPAGANDI ESPERANTON.

Certe ne estas senbezzone memoriĝi al la samideanoj neprecon de la propagando: la aŭtoro tion faras. La proponata de li „Centra Oficejo Propaganda“ estas — niaopinie — nenecesa; tiun taskon devas plenumi P.E.D. **La Red.**

Venis aŭtuno — la plej taŭga sezono por propagandi esperanton. La lernojarro komenciĝis plene, ni uzu okazon! Ni penu kiel eble plej multe diskonigi la kursojn inter plej vastaj rondoj, ĉar de diskonigo dependas nia sukceso. La plej taŭga konvinka maniero estas la **propagando** inter niaj fak- kaj aliaj asocioj kaj societoj. Ni propagandu inter ili bu-

ŝe kaj skribe. Ni montru al ili la neceson de la internacia lingvo. Ni diskonigu la avantaĝojn materiajn kaj moralajn gajnojn. Ni invitu la asociojn kaj societojn diskonigi la kursojn inter siaj anoj. Ni atentigu ilin, ke per la internacia lingvo ili povas interrilatadi kun la samfakanoj kaj interesuloj de la tuta mondo kaj kolekti la plej precizajn kaj valorajn informojn pri ĉiuj demandoj, kiuj ilin koncernas. Plej efike estas, ke ni tiajn kursojn aranĝu kun prelego de aliloka samideano aŭ loka aŭtoritatulo. Ni anoncu tiajn kursojn en loka gazetaro kaj per afiŝoj.

Kiel unu el la plej gravaj aferoj nuntempe estas la fondiĝo de la **Centra Oficejo Propaganda**, kiu per sia programa kaj seninterrompa agado disvastigu la sukcesojn de la lingvo. Ĝi devas esti centrejo de la landa esp.-propagando. La plej bona atingo, la plej grava sukceso ie atingita estus malgrandigata ĝis nenio, se ni ne diskonigus aŭ ne multobligus ĝin per informilo. La fakto diskonigi la informojn, konsistigas la propagandon mem. Ĉiutage okazas diversaj sciindaĵoj. Ni kolektu ilin kaj aperigu en ĉiutagaj gazetoj per **gazetara servo**. Tio estas la plej bona kaj efika propagando de esperanto. Nenio disvastiĝas aŭ enradikiĝas per si mem, ĉio bezonas diskonigon, propagandon. La plej bona libro dum jardekoj kuŝas sur polvaj bretoj de la eldonejo, se oni ne anoncos pri ĝi, ne metos ĝin en montrofenestrojn, ne dissendos provekzemplojn k. t. p. La samo validas pri ideoj. Ili povas esti efektive gravaj, tute certe portontaj nemezureblan utilon al la homaro, sed — tro naive estus kredi, ke ili konkeros la mondon per si mem, ke iun belan tagon ili verŝiĝos super la homaron kiel la sankta spirito iam, kaj ke tuj ĉiuj akceptos la akceptindan. — Ne. Mirakloj ne estu atendataj. Ni rigardu, kun kiaj homoj ni kontaktiĝas. La plejmulto de ili ja absolute ne havas propran koncepton, proprajn pensojn. Kvazaŭ kun klinitaj kapoj ili trenas sin antaŭen, vidante nenion krom siaj botopintoj. Kien la amaso sin direktas, tien ili lasas sin porti. Nur relative tre malmultaj kapablas kun levita kapo observi larĝajn horizontojn, memstare serĉi, esplori kaj — trovi.

Ni liberigu torenton da energio, ĝis nun neracie flankenigata; ni starigu la ĝustan direkton — vojmontrilon, por ke neniu devu erarvagi. — Ĝi — nia devo.

Jen 50-jara jubileo de Esperanto, kiun ni festos en Polujo en la j. 1937, proksimiĝas. Ni devas ja prepari ĉion, ke ĝi estu brila mondfesto de l' homaro. Ĝi montru al la mondo la neceson de la internacia lingvo.

Pro tio esp.-movado ĉiam kaj konstante bezonas kunigon de ĉiuj fortoj kaj unuiĝon de ĉiuj esp.-grupoj en nia lando. Multajn taskojn ni povas solvi nur per kunigitaj fortoj.

Unu el tiuj taskoj estas kolektado de diversaj statistikaj datoj pri enlanda esp.-movado loko, ĉar ofte ni bezonas detalan statistikon por niaj oficialaj institucioj por pruvi, ke esp. en nia lando progresas.

Bedaŭrinde niaj provincaj grupoj ofte ne komprenas la gravecon de tia kunagado, laboras dise, vane malŝparas siajn fortojn kaj sukcesojn ne havas.

La fondiĝonta Centra Oficejo Propaganda posedanta propran gazetaran-servon, multajn korespondantojn en ĉiuj lokoj, kie vivas esperanto — preparu laborprogramon kaj laŭ ĝi plenumu sian taskon. Propaganda oficejo eldonu flugfoliojn, propagandajn broŝurojn, lernolibrojn, posedu librovendejon kaj ĉerpu parte de ĝi monrimedojn, parte de P.E.D. (al kiu aliĝu ĉiuj esp. rondoj, grupoj kaj izoluloj). Propaganda Oficejo aranĝu grupojn kaj korespondajn kursojn, kunhelpu en aranĝo de lokaj propagandvesperoj k. t. p. Tiamaniere ĝi estus la plej efika propagando por Esperanto. La novfandiĝintaj grupoj kaj malfortaj povus esti tiam subtenataj per konsilo kaj agado kaj ne vegeti por morti post ne longe.

Laŭ prilaborita programo de la Propaganda Oficejo, lokaj kluboj, asocioj, rondoj aktive povos kunlabori. Oni dividu la taskojn inter niaj agemuloj. Unuj aliĝu ekz. al sportistoj, aliaj al skoltroj, la triaj al YMCA k. t. p. Kaj tie jam kiel plenrajtaj anoj, kiel membroj de la organizaĵo ili ekagu. Komence singardeme, sed iom post iom kaj rezulto certe estos. Tio estos pli grava kunlaboro en nia movado, ol la plej fidela vizitado de niaj societoj, kie kun bedaŭro ni konstatas, ke oni ne uzas dum la kunvenoj nian lingvon. Esp. klubo devas labori tiel, ke la nacia lingvo estu konsiderata kiel fremda lingvo. Esperantistoj devas ĉiam aŭdi en la klubo nian lingvon, ke per tiaj proponoj mi tute ne neas la gravecon de niaj societoj. Absolute ne. Nur la nesufiĉon de ilia laboro mi substrekas kaj la neceson fari ankoraŭ multon alian.

Jam nun ni povos indiki kelkajn ĝeneralajn konsilojn por propagandi sukcese Esp.; jen ili:

1.) klopodu, ke en via loko estu elpendigitaj la propagandaj afiŝoj kun surpresita adreso kaj horo de la klubkunvenoj. Ĝi troviĝu daŭre (ekz. en ŝranketo) sur ofte vizitataj lokoj ekz. en fervojstacidomoj, oficejoj, kafejoj, en kuracistaj atendejoj, en tramoj k. t. p., ĉie do, kien venas multaj homoj.

2.) Portu ĉiam Esp. insignon kaj ne nur, kiam vi iras inter esperantistojn. Ĝi estas plej efika la plej malkara konstanta propagandilo.

3.) Kunlaboru en la gazetara servo. Sendu sciigojn ricevatajn pere de espe-

ranto kaj tradukitajn sendu al loka gazetaro kun noto „pere de esperanto“. Ĝi estos gravega propagando por la vasta publiko.

4.) Posedu ian kvanton da propagandiloj (flugfolioj) en pola lingvo por disdoni du propagand-broŝurojn kaj pruntedonadu ilin al viaj amikoj.

5.) Aranĝu esp. ekspozicion, prelegon pri esperanto kaj kursojn.

Jen ĉi supraj konsiloj estas devoj de aktivaj esp. — kaj, kiel ni scias, aktivulo estas ano de movado, kiu fervore laboradas, konstante varbas por la movado, subtenas ĝin morale kaj laŭeble materiale. Se ĉiuj plenumos sian propagandcelon, ni post nelonge atingos dezirindan rezulton.

**Emil Mayer, Kraków, Lelewela 9.**

## VOJOJ AL MONDLINGVO.

Ekzistas kvar vojoj al mondlingvo, rigardata aŭ kiel helpa lingvo apud la gepatra, aŭ kiel unika lingvo de la homaro.

1. La fandiĝo de ĉiuj lingvoj rezulte de la intermiksiĝado de la popoloj.

2. La iompostioma kul'tura kaj ekonomia superregado de nun potenca lingvo super la ceteraj, ĝis tio, ke fine ĝi englu'tus ilin. (Tiuĵ du procedoj postulus multege da jaroj).

3. La akcepto fare de la grandnacioj de unu nacia lingvo, kiun ili uzus en ĉiuj eksterlandaj rilatoj.

4. La adopto fare de la nacioj aŭ la popoloj de iu arta lingvo, neŭtrala, helpa.

### Fandiĝo de la lingvoj?

1). Kelkaj pensuloj asertas, ke la unuiĝado de la popoloj pro la ĉiamkreskantaj faciligiloj de trafiko kaj interkomunikado iompostiome rezultigos estiĝon de unu lingvo komuna por ĉiuj homoj. Sed la filologio ne senrezerve subtenas tiun kredon. Prof-o T. Cart (Sorbonne) ne hezitis nomi tian rezonadon falsbaza, kaj rimarkigis, ke en la 19a jarcento estis vaste sed nevere tenata de fakuloj la opinio, ke la lingvoj emas sin centralizi, direkte al eventuala superregado de du tri ĉefaj lingvoj. Kontraŭdire al tiu tezo, ekzistas nune en la mondo pli da lingvoj ol en 1914 j. Ne centraliziĝo sed federaliĝo karakterizas la nuntempan mondpolitikon. La nacioj alproksimiĝadas unu al la alia en politiko-ekonomiaj grupoj, sed intensa naciisma spirito igas ilin ĵaluze gardi la lingvon de siaj antaŭuloj. En Rusujo okdek-kelke da lingvoj zelote kulturataj ĉiu laŭ sia propra spirito nun sekvas klare markitajn liniojn de evoluado. La ĉeĥa, kataluna, hungara, la idiomoj de la Baltlandoj, kaj aro da slavaj en la Sud-Oriento de Eŭropo (el kiuj lastaj la pliparto naskiĝis el la frakasiĝo de la Aŭstro-Hungara Imperio), ĉiuj parolas forte kontraŭ la

kredo, ke Eŭropaj lingvoj evoluas al unueco.

### Ĉu laŭevolua superregado de potenca lingvo?

2. La historio instruas, ke la grandetendaj gajnoj de lingva teritorio profite al tiu aŭ alia reganta nacio ne havas pli ol provizoran karakteron. La vivi-povo aŭ disvastiĝo de lingvo dependas, re de siaj esencaj bonkvalitoj, sed de la sukceso kaj influo de la popolo ĝin uzanta. La greka kaj latina, interlingvoj en limigita senco, jam de longe ĉesis esti tiaj. Ankaŭ forpasis la favortempo de la franca por tiu rolo. La progreson de la araba egalas aŭ superis nur la angla, kiu siavice montras signojn esti atinginta sian apogeon de ekspansio. H. G. Wells diris, ke baldaŭ definitive forpascos la ĉiam pli malgrandiĝantaj ebloj, per kiuj decidemaj ŝtatviroj povus fari la anglan komunan interkomunikilon de la tuta Azio sude de la Himalajo. „Mirfrapate oni trovas, kiel malrapide disvastiĝis la angla kontraŭ multe malpli taŭgaj lingvoj. La angla ankoraŭ ne povas forpremi la francan for de Franc-Kanado, kaj ĝia superiĝo en Sud-Afriko estas hodiaŭ, post jarcento de Brita reĝo tie, tre duba“.

Antropologo ĉe scienca kongreso en Melburno lastmonate asertis, ke penadi instrui la anglan al Pacifikaj nigrujoj signifas tempomalspari, kaj ke en proporcio je la lingva sukceso ĉe kelkaj individuaj indiĝenoj, ĉi tiuj suferas gravan baton al sia propra psiko, en tio, ke ilia pensa kaj spirita fono (antropologe cetere tre valora) estas difektata pro la neceso pens- kaj paroladi en fremda por ili medio. Li proponas pli science aplikatan uzon de la piĝin-angla por tiu kaj similaj kampoj.

Ankaŭ la Guberniestro de Ugando, Sir W. Gowers, ne konsentas, ke la Anglan oni propagandu kiel la helplingvo en la Brit-Afrikaj teritorioj. Li diris („Brit. E-

spist" Dec. 1932): En Orient-Afriko Kiswahili estas la ununura vulgaringvo, kiu havas eĉ ŝancon finfine mon'riĝi pli ol simpla fiasko en Ugando, same kiel en Kenjo kaj Tanganjiko.

„La provo uzi la anglan inter la nigruoj plejofte rezultigas disvastiĝon de barbara ĵargono anglaĵa, instruata de nekompetentuloj. Eĉ tie, kie (ekzemple en Sierra Leone) la angla jam de generacioj estas uzata kiel helplingvo, kaj efektive estas la propra lingvo de la pliparto de la indiĝenoj en Freetown, ĝi jam fariĝis lingvo, kiu, malgraŭ sia eŭfemisma nomo, estas preskaŭ tiel malfacile lernebla kiel iu efektiva Afrika dialekto“.

#### Ĉu akcepto de nacia lingvo?

Prof-o Guion rimarkigis, ke, dum lingvoj reciproke prunteprenas vortojn kaj idiotismojn, la sintakso de unu lingvo alia tute ne adoptas. Li kromdiris, ke homo povas lerni dek diverslingvajn vortarojn en la tempo, kiun postulas posedo de la senfinaj subtilaĵoj de sintakso en nur unu lingvo. Jen kie kuŝas unu el la plej gravaj malfaciloj frontantaj tiujn, kiuj propagandas akcepton de nacia lin-

gvo. Spertoj de instruistoj de la franca lingvo en anglaj lernejoj kaj alilande ne estas kuraĝigaj; oni povus nomi ilin eĉ ĉagrenaj, kiam oni kalkule pripensas la longegan tempon kaj feran paciencon, kiujn tiom da homoj dediĉas, studante idiomon, kiu, male al ĝenerala kredo, estas unu el la plej komplike subtilaj lingvoj en Eŭropo. La ĝitala aŭ la hispana, pli simpla de la vidpunktoj fonetika kaj sintaksa, ŝajnus pli bone atingi la celon, por kiu nun oni instruas la francan en nefrancaj lernejoj. Precipe en unulingva lando estas diskutbla tio, ĉu la gajno, nome: produkti kelkajn premi-gajnintojn kun lingvolerna talento, kom-pensas la koston kaj klopodadon, kiujn formariĝas tia instrusistemo.

#### Kial ne neŭtrala?

4. La solvo do troviĝas en adopto de arte-sinteza lingvo, facile lernebla, neŭtrala, sed bazita sur la ĉeflingvoj de Eŭropo. Tio donus al neniun nacio maljustan kulturan aŭ komercan avantaĝon super la aliaj; kontraŭe, ĝi loĝus la popolojn al profita studo de la naturo kaj strukturo de la propra lingvo.

R. Banham, Melburno, Aŭstralio.

## TIEL — AŬ INVERSE.

Pala timo kaptis Italujon. Teruro ekregis en la Eterna Urbo. La gazetoj ne kuraĝis ankoraŭ sciigi al la civitanoj la veran staton de la aferoj, tamen de buŝo al buŝo pasadis famoj ĉiam pli nigraj, pli timigaj, monstraj. Oni sciis, ke la bravaj italaj soldatoj ne povis elteni plu la premon de la kontraŭuloj. Oni sciis, ke la heroaj vicoj, dekonigitaj, ne! — centonigitaj de la superega malamiko, panike retiras sin al la lasta rifuĝejo, al la Urbo. Oni sciis, ke gasaj nuboj rampas sur la verdaj vinberkampoj, ke morto embuskas sur la tero, morto hajlas de la ĉielo. Kvazaŭ lokusto tiris de la sudo nigraj soldatoj, kaj jen Romo rememoris la malnovajn, pasintajn tagojn, kiam Hanibalo staris antaŭ la pordegoj.

Sed Hanibalo ne havis ŝtalajn flugilojn. Li ne povis pluvigi bombojn de supre aŭ gasveneni la senkulpan, kompatindan loĝantaron.

Kaj dume Negus, armita per ĉiuj ĝeniaj eltrovaĵoj de nia glora civilizacio, ĉirkaŭfermis la urbon per ringego de kanonoj kaj sternis super ĝi nubon el fumo kaj gasoj.

Do sonoris laŭte ĉiuj sonoriloj, brulis incensoj antaŭ altaroj kaj petegaj voĉoj levis sin al Dio, por ke Li forturnu

de Romo la tagon de Sia kolero. Patrinoj vokis kompaton por siaj filoj, pereantaj sur la batalkampo, kaj por siaj infanetoj, disŝiritaj per bomboj, venotaj per gasoj ĉe la hejma sojlo aŭ en la lerneja korto. Patroj de familioj acetadis gasmaskojn, la urba garnizono laboregis febre por havigi al la loĝantaro almenaŭ joman nombron da rifuĝejoj kaj doni al ĝi almenaŭ iluzion de sekureco.

La diplomatoj sole ŝajnis ankoraŭ trankvilecon. Ne utilis rezoni kontraŭ la kanonoj de Negus, do sian tutan atenton, sian tutan lertecon ili centrigis pli norde, apud la blua Lemano, kie komisioj okupis sin pri la esplorado de la situacio — kaj ili vokis al konscienco de la mondo.

Sed la konscienco de la mondo havis vaton en la oreloj. La konscienco de la mondo ekzamenis la regularon kaj plezure kredis, ke la unua kuglo estis pafita el ĝitala pafilo, ke la etiopoj, kiuj kun senkulpa armopreteco gardostaris ĉe la italaj limoj, estis provokitaj, devigitaj defendi sian suverenecon. La konscienco de la mondo tiel ŝatas la dolĉan fumon de narkotikoj...

Cetere — oni siamaniere montris simpatian al la italaj delegitoj. Oni pre-

madis kondolence iliajn manojn, oni fotografadis kaj filmadis ilin, kelkaj ĵurnalistoj eĉ intervjuis ilin....

Tie kaj ie en la mondo leviĝadis voĉoj, ke oni ne povas permesi forbuĉon de la viva nacio kaj lavi la manojn, kiel Pilato. Aŭdiĝis voĉoj, ke tiu popolo, sufokata de angoro antaŭ la mortfantomo, ankaŭ ja apartenas al la granda familio de popoloj de l' tero, ke ĝi rajtas sian lokon ĉe la ronda tablo de l' homaro, ke oni ne povas fermi la okulojn kontraŭ tiu krimo kaj reteni la helpan manon de la bezonanto.

Sed en la Palaco de Nacioj regis plue — la konveneco. La diplomatoj esplordis unuj la aliajn. La kunsidoj daŭris, le sekretarioj stenografis,

La itala ministro ankoraŭ politikis. Diplomata rideto kovris ankoraŭ lian angoron. Sed telegrafaj fadenoj portadis al li novaĵojn ĉiam pli funebrajn kaj dolore tordiĝadis lia koro. Tamen li altetenis ankoraŭ sian belan kapon, kiam alilandaj reprezentantoj protekteme frapis liajn ŝultrojn.

Ĉe la fino de unu el tiuj senfruktaj kunsidoj, en kiu la diskutoj turnis sin en la sorĉa rondo de paraĝrafoj, en kiu la okuloj de tiu kaj iu el la reprezentantoj strabis diskrete al horloĝo kaj la buŝo penis superregi oscedon, enkuris pala sekretario kaj transdonis al la itala ministro telegramon.

La prezidanto estis finanta siajn vortojn. La lastaj sonoj eĉis ĉe la muroj. Por hodiaŭ la kunsido estas fermata, kaj morgaŭ...

La diplomatoj komencis kolekti siajn paperojn. Unu kaj dua leviĝis jam de sia mola brakseĝo. Kaj subite la brueton de la disiro penetris voĉo tiel forta, tiel plena je doloro, ke ili ĉiuj senmoviĝis. Apenaŭ ili rekonis la kutime sinregantan italon.

Kaj li staris kun pala vizaĝo, kun okuloj, en kiuj fulmis lia tuta krucumita animo, kun brakoj etenditaj, kvazaŭ li volus reteni najli al la seĝoj la forirantojn, kaj vokis: „HALTU!“

Io tiel penetra, tiel korŝira estis en lia tono, ke ĝi saĝnis plu ne voĉo de unu homo, sed de la tuta malespera popolo:

„Sinjoroj — li vokis, etendante al ili la telegraman slipon — Romo ne ekzistas plu!!!“

Kelkaj buŝoj malfermiĝis kvazaŭ por ekkrio, sed tiu ekkrio mortis en la gorgoj sufokitaj de la konsterniga novaĵo.

Kaj la italo, tremante kvazaŭ ventoskuita arbo, vokis:

„La urbo estas unu grandega ruino! La tuta loĝantaro — ĉiuj — viroj, vi-

rinoj, infanoj — pereis, murditaj per bomboj kaj gasoj!!!“

Senmoviĝis eĉ la stenografantoj, eĉ la filmistoj...

„Nia reĝo pereis en la ruinoj de sia palaco — nia Duce pereis — en nia armeo paniko — la etiopoj disverŝas sin tra la tuta lando!!!“

La silenta streĉo rompiĝis. Vento de murmuroj trakuris la salonon. Palaj kapoj ekmoviĝis, kvazaŭ spikoj, taŭzitaj de vento.

Kaj la italo ne povis plu regi sian suferegon. Kun larmoj en la okuloj, per voĉo rompata de plorĝemoj aŭ morthaltante iafoje en la gorgo, li vokis:

„Sinjoroj! De semajnoj daŭras ĉi tie la komedio! Vi diskutas, esploras, kaj dume — dume oni murdas mian popolon!!!... Mi ne povas plu paroli la lingvon de la diplomatoj... Mi ne kapablas plu politiki... Helpu nin, ĉar ni mem estas tro malfortaj!... Defendu nin de nia malamiko, ĉar li ekstermas nin!!!... Vi ja ankaŭ estas homoj... Vi ja... ankaŭ... havas patrujon!...“

Larmoj torentis sur liaj vangoj. Li ne hontis. Li ploris. Li ploris antaŭ tiu tuta brila ĉeestantaro, li ploris en la Palaco de la Nacioj, kie kunsidas la konscienco de l' mondo.

Kaj tiu ploro rompis la kirasojn de diplomateco. Ĉiuj delegitoj eksentis sin sub te homoj. En ĉies koro ekfulmis subite terura bildo de lia propra patruro, disŝirita per la ungegoj de la militmonstro. Naskiĝis kompreno por la homa doloro. Vekiĝis la konscienco de la mondo...

En tiu nokto ne estingiĝis la lampoj en la Palaco de Nacioj...

Kaj kelkajn tagojn poste la etiopaj trupoj rapide retiris sin el Italujo.

...Ĉar ĉiuj nacioj de la tero leviĝis indigne kontraŭ la pacrompinto, pretaj defendi Italujon. Ĉar vekigi la konscienco de la mondo... **UDEV-anino.**

**La dua kajero de la II-a eldono de la „ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTO“**

(sub la redakto de J. Zawada)  
baldaŭ aperos!

La unua kajero, aperinta en julio 1935, enhavas adresojn de 887 pollandaj esperantistoj kaj en sia „Informilo“ — adresojn de 163 nun aperantaj Esp.-gazetecoj de tutmondo!

Kvaronjara abono 1.— zł. Adreso: Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj, Warszawa, Al. Jerozolimskie 101.

PKO 20845. (Przekaz rozrachun. nr. 440).

malkovris antaŭ nelonge rondan ŝtonan preĝejon el XI. jarc.; plej malnova ĝi estas en la tuta Polujo. Oni malkovris samtempe la restaĵojn de unua katedralo de roma stilo, konstruita en 1000 de Boleslao la Granda.

Kia estas la interno de la palaco? Ambasadoroj de la fremdaj potencoj priskribis tion en la 16 jarcento dirante, ke nek franca reĝo, nek mem roma papo, nek veneciaj doĝoj posedas similajn grandiozajn palacojn. Dum la tempoj de mallibere ĉio estis forrabita aŭ malkonstruita, ŝanĝita je militistaj kazernoj.

Nuntempe grandparte la tuto estas rekonstruita kaj revenis en la antaŭan brilecon. La kastelo renoviĝas kiel sidejo de Prezidanto de la Respubliko. Revenis multaj valoregaj memoraĵoj: mebloj, ĉefverkoj de la pentristoj kaj skulptistoj. Post la venko de Piŝudski en la kontraŭrusa milito revenis ankaŭ valoregaj „arras”oj de Sigismundo Aŭgusto en la nombro de cirkaŭ cent. Tiuj „arras”oj - tapiŝoj estis faritaj en 16 jarcento de plej famaj bruselaj majstroj. Ili prezentas nuntempe plej valorajn artistajn ornamaĵojn de reĝaj ĉambregoj en la kastelo. El humiligaj kaj ruinigo iom post levigas la Vavela kastelo kaj renoviĝas ĝia reĝa vestaĵo. Dum pasintaj tempoj ĝi partoprenis ĉiujn ĝojajn kaj malĝojajn momentojn de nacia vivo — same nun post la revivigo de Polujo regajnas sian majestan aspekton.

Dank' al tio Wavel estas kaj restos vere mistika simbolo de la pola historio.

Tradukis prof. dr. Odo Buĵwid

## HOLANDA GRUPO

organizos letervesperon je 20. de decembro. Samideanoj el ĉiuj landoj, sendu poŝtkartojn, leterojn salutojn k.t.p. al la gvidanto, kiu garantias respondon, s-ro C. Grof: Vijghstraat 51.

Nymegen, Holando.

DR. JERZY DOBRZYCKI.

## Wawel — Pola Panteono.

Preskaŭ en la mezo de Eŭropo, proksime al la limoj de Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo inter pitoreskaj montetoj sur la bordoj de la rivera rubando, Vistulo, kuŝas plej bela urbo de Pollando — Kraków. Iam dum la jarcentoj — fiera ĉefurbo de la potenca pola regno, sidejo de la reĝaj dinastioj de Piastoj, Andegavenoj, Jagelidoj kaj Vazoj, dum postaj tempoj, precipe dum mallibero de Pollando, dum la 19 jarcento, — spirita ĉefurbo de la pola nacio kaj ĉefa centro de la scienco, arto kaj kulturo. Tiu urbo estas hodiaŭ tute prave fierajo de Poloj, por eksterlandanoj tamen dank' al ĝia beleco kaj grandega nombro da antikvaj monumentoj de la pasinteco unu el plej interesaj en Eŭropo turistaj objektoj.

Tie ĉi estas multe por vidi inter dignaj muroj de unu el plej malnovaj en Eŭropo universitatoj, en kiu lernis iam genia Niklao Kopernik. Ekzistas ja 50 malnovaj preĝejoj, multenombraj muzeoj, malnovaj palacoj kaj domegoj. riĉegaj bibliotekoj. Estas ja ĉio plej bela kaj nobla, kio konserviĝis dum 1000 jara perlaboro de pola spirito.

Sed en la urbo estas loko superanta ĉion alian el la historia vidpunkto. Tio estas, staranta sur la altaĵo super la urbo. malnova reĝa kastelo, Wavel (elp.: Vavel), loko por ĉiu Polo plej kara kaj sankta. Por Poloj ĝi havas la saman signifon, kiel por aliaj nacioj prezentis Siono, Akropolis kaj Palatino. Estas ĝi vera pola Panteono. Vera kialo de la signifo konsistas en la kunligo de Wavel kun ĉiuj historiaj momentoj de Pola regno. Nenie en la mondo ekzistas urbo, kiu tiamaniere spegulas la tutan historion de iu ajn lando, kiel Wavel spegulas la historion de Polujo. Dank' al tio ĝi estas ne nur historia reĝa kastelo, trezorejo de monumentoj

kaj verkoj de l'arto, super kiuj svarmas oraj fadenaroj de grandiozaj memoraĵoj, — Wawel estas por Poloj io centfoje pli grava, estas la sintezo de la historio, simbolo mistika de Polujo.

Pasintaj dum rapida forkuro jarcentoj lasis tie ĉi multajn postsignojn, ensorĉigitajn en marmoro, ŝtono kaj bronzo. Enskulptigis ĉi tie ĉiuj gravaj historiaj momentoj kaj ĉiuj emimentaj personoj. Ŝajnas, ke Wawel estas malfermita libro de pola historio, instruanta pri pasintaj tempoj, Unue subaŭskultis ilin poetoj. Unu el ili, Wincenty Pol, jam tre maljuniginta, blindiginte igis sin transporti, pripalpis la ŝtonojn de Wawel kaj longe parolis kun ili. Li asertis, ke la muroj de la kastelo vivas kaj scipovas paroli.

Lastatempе plie kreskis la signifo de Wawel.

La 18 de majo ĉi-jare (1935), estis ripoziginta en Vavela katedralo, inter tomboj de polaj reĝoj, la ĉerko, entananta korpajn restaĵojn de Józef Piłsudski, neforgesebla ĝvidanto de la Nacio. Ĉerko, abunde kovrita de larmoj de la tuta pola popolo.

Depost tiu fakto Wawel iĝis centra punkto de pilgrimado por ĉiuj, kiuj volis klini la kapon antaŭ homaj restaĵoj de la Patro de Patrujo. Ĝis nun preskaŭ duonmiliono da pilgrimantoj el ĉiuj partoj de Polujo venis Krakovon, por saluti la ĉerkon kaj partopreni en la konstruo de memormonteto por Piłsudski. Miloj kaj miloj la pilgrimantoj ŝutas sablon, alportinte ĝin el ĉiuj partoj de la patrolando. La surŝutaĵo kreskas kiel monto por la eterna memoro. Ĉiu pilgrimanto en profunda silento ĉirkaŭiras la tombon, enhavantan karrajn restaĵojn, kuŝantajn en la tombejo reĝa, kaj poste iras plenumi la praavan kutimon: surŝuti sablon sur la monteton. Jen la pruvo de senfina amo kaj profunda adoro por la Patro de la Patrolando.

Kune kun la aroj da pilgrimantoj, alfluantaj el proksimaj kaj malproksimaj landoj, aŭskultu kaj ni la ĉarmajn legendojn, komencante de prahistoriaj tempoj al ĝisnunaj tagoj. El malnovaj pitoreskaj stratoj de la interna urbo alproksimiĝu al la bazo de Vavela altaĵo.

estis konstruita laŭ la ordono de Sigismundo la I en 1517—1533 sub la gvidado de itala majstro de Firenze Bartolo Bo-recci, distingigatas per vere reĝa grandiozecc kaj samtempe per puraj formoj de florenca quattrocento. Ĉi tie dormetas sur la sarkofagoj du lastaj Jagelidoj, plej fervoraj mecenatoj de arto: Sigismundo la Unua kaj Sigismundo Aŭgusto. Flanke brilas inter marmoroj argenta altaro super tiu miraklo de l'arto, ekstere levigatas alta kupolo kovrita per oraj skvamoj, kiel simbolo de Ora Epoko de pola kulturo.

En subteraj kriptoj dormas ĉiuj supre nomitaj reĝoj en riĉaj sarkofagoj: Jagelidoj, Vazoj, heroa Stefano Batory, venkinto de Turkoj apud Vieno, Jan Sobieski. Tute flanke apud ili pola popolo kuŝigis mortajn restaĵojn de du siaj herooj, plej grandaj batalintoj pro libereco, Tadeo Kościuszko kaj Jozefo Poniatowski, samtempa marŝalo de Francujo, mortinta en batalo ĉe Lejpcig en 1813.

En aparta kripto de roma stilo el 11 jarcento, kie kuŝas ambaŭ ĉi nomitaj herooj kune kun Jan Sobieski estas antaŭ ne longe deponitaj la restaĵoj plej karaj por la nacio de Józef Piłsudski. Lia morta kormo estas kuŝigita en argenta ĉerko, sed lia spirito regas plue Pollandon, montrante al ni vojon por plua disvolviĝo de lasendependa Patrujo. En la aparta subteraĵo kvietas du reĝoj de pola spirito, plej grandaj polaj apostoloj de liberigo de Patrujo: Adam Mickiewicz kaj Juliusz Słowacki.

Dum multaj tagoj oni povus iradi kaj vagadi inter tiuj sanktaĵoj de Polujo kaj renkontadi ĉiam novajn belaĵojn. Sed estas tempo marŝi antaŭen. Tra la grava arkaja pordego ni traŭru sur la korton de la reĝa kastelo. Malfacile estas pri-skribi la potencon de la unua impresio. Ni staras sur larĝa korto, pli granda ol ĉiuj konataj en Italujo. Ĉirkaŭe arigas unu super la alia tri galerioj kun kolonaroj ligitaj je rondaj arkafagoj. Estas tuj rimarkebla mano de unuarangaj florencaj majstroj. Ili laŭ la komisio de Sigismundo kaj lia edzino Bona Sforza konstruis la verkon en la j. 1502—33 kaj preparis el tiu korto terenon taŭgan por turniroj, ludoj kaj festenoj. Tiu palaco iĝis sur la loko de antaŭa mezepoka kastelo. Kelkaj ĉambregoj posedas ĝis nun gotikan formon, kaj en la fundamentoj oni





## RECENZOJ.



Aperis jam du volumoj de „Norda Literaturo“, kaj la tria volumo estas en preparo. Tio estas perioda eldonaĵo, aperanta ĉe S-ano K. Strazds en Jelgava, Latvio, sub la redakto de T. Indra. La 2 volumoj entenas interesajn literaturojn el la estona, latva kaj litova lingvoj, kiuj al ni, esperantistoj, almenaŭ parte permesas konatiĝi kun la literaturoj de la nomitaj popoloj, kies lingvojn ni neniel povas kompreni. La ekzemplo de la nordaj landoj estas imitinda, ĝi faras grandan servon propagandan por la landa literaturo kaj ankaŭ por esperanto. Tio estas unu el la ĝustaj kampoj, en kiu esperanto devas trovi aplikon. Precipe la landoj kun la tiel nomataj „neeŭropaj“ lingvoj devas imiti la ekzemplon de la nordaj samideanoj.

(HG).

Pro esceptaj malfavoraj ĉirkonstancoj, ni ne sukcesis plurajn ĝis nun senditajn librojn recenzi. Ni klopodos tamen depost venonta n-o konstante doni la recenzojn. Pro la prokrasto ni pardonpetas la eldonantojn.

La Red.

**INTERPOPOLA KONDUITO.** Originale verkis Dr. Edmond Privat. 144 paĝa. Prezo broŝ. 3.— bind. 4.50 sv. fr. en falsa ledo sv. fr. 5.— plus 10% por sendkostoj. La unua libro de la artosciencia serio le AELA 1935.

**E. PHILLIPS OPPENHEIM:** La Ora Ŝtuparo. Havebla ĉe Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn, London W. C. 1. Prezo bind. 3 ŝ. 6 p. afranko 4 p.

**BES-a ADRESARO por j. 1935-36.** Havebla ĉe BES, Potštejn, Ĉeĥoslovakujo. Prezo 1 sv. fr.

**JULIA ŜUPICHOVA:** Samideana vortaro. Eld. Ant. Prazák, Jablonné n. Orł., Ĉeĥoslov. Prezo 2.50 kĉ. aŭ 1 intern. poŝta respondkupono.

**TULICZIN:** Rusa-esp. vortaro. Riga 1935. Prezo 1.50 latoj.

**PETRO DANOV:** La Spirito kaj la Karno.

**GIUSEPPE MAZZINI:** Devoj de la homo.

**THILANDER - TANCREDI:** Jarlibro de la Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj (UABO) 1933.

Eldonaĵoj de LITERATURA MONDO (Budapest IX. Mester u. 53.):

3

Supre disvolvigas longa renesanca fasado de la reĝa kastelo, devenanta de la unua mezo de la dekseca jarcento. Dekstre ni vidas supreniri konstruitan el ŝtonoj kaj brikoj gotikan konstruaĵon de la katedralo el 14 jarcento. Ĝi estas Pola Westminster kronita supre de kelkaj altaj turoj. Ucu el ili enhavas plej grandan sonorilon en Polujo, nomatan Zygmunt (Sigismundo), fanditan el militkonkeritaj kanoj en la jaro 1520. Tiu ĉi sonorilo majeste sonas nur dum grandaj festotagoj aŭ naciaj festoj. Post mallonga momento ni staras antaŭ la unua pordego, nomita blazonpordego. Super ĝi sur malnova bastiono levigas granda statuo de nia amata, nacia heroo, Kościuszko, rajdanta surĉevalo. Fama Tadeusz Kościuszko, viro militinta por la libereco de Polujo kaj Nord-Amerikaj ŝtatoj. Jen levinte dekstran manon li ŝajnas saluti arojn da pilgrimantoj, vizitantaj la kastelon. Li estas vera peranto inter malnova reĝa kaj nova demokrata Polujo.

Post trairo de la dua pordego ni preteriras la katedralon. Trans larĝa placo, sur kiu staris iam konstruitaj diversaj konstruaĵoj kaj preĝejoj, ni iru al la okcidenta flanko de la altaĵo, kies bazon preterfluas Vistulo. Tra malgranda tureto kun kruta ŝtuparo ni povas malsupreniri suben por rigardi larĝan groton, kavernon elskulptitan de la naturo sub la jura masivo de la altaĵo. Ĝi estas t. n. kaverno de drako. Ĉi tie en pratempoj komenciĝis la historio de Krakovo. Laŭ la malnovaj legendoj en la groto loĝis terura drako, kiun mortigis brava princo Krak. La venkinto donis sian nomon al la novefondita de li urbo sur la loko, kie reĝnis drako. Pro la memoro pri Krak la dankema popolo laŭ malnova tradicio konstruis arte surŝutitan monteton, kies enhavon nuntempe esploras Pola Akademio de Sciencoj.

Vizitante la groton, ni returnas nin al la katedralo. Jus ĉe la enirejo ni rimarkas pendantajn ostojn de diluviaj bestoj, kiujn popolo opiniis esti la restaĵoj de drako.

Ni eniru nun en la internon de la grandvalora sanktejo, kie iam ricevadis reĝan kronon la reĝoj kaj kie ili estas entombigitaj. La katedralo devenas de la jaro 1320—64 kaj estas tria laŭvice katedralo sur la Wawelo. En ĝiaj dignaj muroj

**ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO**, vol. I kaj II. La plej grandioza verko de nia literaturo. 900 paĝa. Prezo de ambaŭ volumoj broŝ. 30.— sv. fr.

**GRENKAMP - BRZEKOWSKI**: Pri 1<sup>a</sup> Moderna Arto, 68 kliŝpaĝoj kun 74 ilustraĵoj, 32 teksto. Prezo afrank., 7.70 sv. fr. por AELA-anoj 4.60 sv. fr.

**WEINHENGST**: Turstrato 4. 176-paĝa originala verko scenigita en la laborista kvartalo de Vien. En stilo de Zola. Prezo afrank. 4.— sv. fr. por AELA-anoj 2.40 sv. fr.

**AISBERG**: Fine mi komprenas la radion! Libro tradukita en dektri lingvojn el la esperanta originalo. 140 paĝa kun 245 ilustraĵoj. Prezo afrank. 4.95 sv. fr., por AELA-anoj 3.— sv. fr.

**KARINTHY - TOTSCHÉ**: Vojaĝo en Faramidon kaj Du ŝipoj. Noveloj, 88 paĝa, broŝur. Prezo 1.20 sv. fr.

**ADAMSON**: Auli. Novelo 88 paĝa. Prezo broŝ. 1.60 sv. fr.

**KALOSCAY**: Dekdu poetoj. 128 paĝa. Prezo broŝ. 2.50 sv. fr.

**KALOSCAY - WARINGHIEN**: Plena gramatiko de Esperanto. Vorto kaj frazo. La unua libro de „Lingva Serio“ de AELA por 1935.

**JEROME K. JEROME**: Tri homoj en boato (por ne forgesi pri la hundo). La

unua libro de „Beletristika Serio“ de AELA por 1935.

### WAŻNE DLA SZKÓŁ I SAMOUKÓW!

Już ukazało się II-gie wydanie aprobowanego przez Ministerstwo W. R. i O. P. podręcznika esperanckiego p. t. „LEKCJE JEZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO” — w opracowaniu prof. Sygnarskiego z przedmową prof. uniw. dra Bujwida. Cena podręcznika, zupełnie zmienionego, znacznie rozszerzonego i zaopatrzonego w dwa słowniczki — tylko 2 zł. Do nabycia w Administracji „Pola Esperantisto”, Kraków, Lubicz 34. (Konto PKO 406.660) lub w „Naukowym Kole Esperanckiem”, Bydgoszcz, plac Wolności 9. (Konto PKO 141.787).

### OBNIŻKA ABONAMENTU!

Każdy abonujący na rok 1936. miesięcznik „Pola Esperantisto” wpłaca do dnia 31. grudnia 1935. tylko zł. 6.50. Po tym terminie abonament wynosi zł. 8 rocznie. Korzystajcie ze zniżki!

Konto PKO 406.660.

Ni sciigas nian legantaron, ke la postenon de Respondeca Redaktoro prenis nun s-ano Dro Leon Rosenstock.

4

en 18 ĉirkaŭantaj ĝin kapeloj la jarcentoj arigis senombrajn memoraĵojn, artverkojn, altarojn, monumentojn, skulptaĵojn kaj multenombrajn juvelojn. Meze de la preĝejo levigas kapelo kovrita per ora kupolo, en kiu kuŝas argenta tombo, subtenata de flugiloj de anĝeloj. La ĉerko entenas la ostojn de nacia patrono, s-ta Stanislaŝo, krakova episkopo, mortigita de Bolesław la Kuraĝa, reĝo pola en la jaro 1079. Ĉi tie ankaŭ kuŝas la ostoj de s-ta Florian, kunpatrono de la nacio, roma martiro, precipa protektanto kontraŭ brulegoj. Antaŭ la altaro iam estis aranĝataj kronadaj festoj, kaj oni aranĝadis dancajn festojn post la venkaj super malamikoj. Tie ĉi ankaŭ oni pendigadis forprenitajn de malamiko standardojn.

Plue en la navoj de la katedralo dormas elforgitaj de mezepokaj skulptistoj sur ŝtonaj kaj marmoraj sarkofagoj plej grandaj reĝoj. Ĉi tie kuŝas Vladislao Lokietek, mortinta en 1333, malgranda pri la korpo, sed granda pri la spirito, plue lia filo, la lasta Piasto, Kazimiro la Granda, mortinta 1370, perfekta mastro kaj organizanto, legdonanto, protektanto de la kamparanoj kaj fondinto de la krakova Alma Mater. — La Jagelona Universitato. Plue elskulptita en blanka marmoro Jadwiga (Hedvigo) Andegavena m. 1399, apostolino de Litovujo, kiu ligis tiun landon kun Polujo pere de edziniĝo al Jagello, reĝo de Litovujo. Tute proksime staras la monumento de tiu reĝo, m. 1434, fondinto de potenca dinastio de Jagelidoj, kiu regadis en Polujo, Hungarujo kaj Bohemujo. Kontraŭe levigas la monumento de lia filo Władysław (Ladislao), mortigita apud Varna en batalo kontraŭ Turkoj en jaro 1444. La tombo de lia frato kaj heredanto, Kazimiro Jagelido m. 1492 staras en grandioza gotika kapelo de S-ta Kruco, konstruita de tiu reĝo kaj lia edzino Elizabeto de Habsburg, admirinda ĉefverko de la plej fama verkisto-skulptisto de mezepoko Wit Stwos, vera poemo en-sorcigita en marmoro, senkompara beleco de la malfrua gotiko.

Krom la kapelo estas rimarkinda fama kapelo de Sigmundo, plej bela perlo de itala renesanco de transalpa regiono, kiel ĝin nomas multaj esploristoj germanaj. La verko

## Sunbrilo.

La suno brilas ĉe l' ĉielo  
kaj ĉiun floron kisas ĝi,  
banantan sin en la sunhelo,  
dum sonas ĉie birdari'.

Kaj ĉiun floron kisas ĝi;  
ĉi ĉio ŝajnas ja fabelo!  
Dum sonas ĉie birdari',  
sur akvo dancas la libelo.

Ĉi ĉio ŝajnas ja fabelo!  
Aperas antaŭ mi fein',  
sur akvo dancas la libelo,  
ravite mi rigardas ĝin.

Aperas antaŭ mi fein',  
bananta sin en la sunhelo;  
ravite mi rigardas ŝin. —  
La suno brilas ĉe l' ĉielo.

Jan van Schoor.

ALBRECHT RODENBACH.

## La kanteto de l' pafilo.

POLA KNABOKANTO.\*)

Strange mia kor' tuŝiĝas,  
kiam mi ĉe kamparan'  
ĉaspafilon je vidas  
en angulo de l' kaban'.  
Mia korp' tremetas, kiam  
mi aŭskultas je l' vesper'  
kornoludon kaj pafadon,  
resonantaj tra l' aer'.  
trarah, trarah,....  
Pif paf! fumo leviĝas,  
eĥas jen fore de l' pafoj la bru'.  
Pif paf! kore respondas:  
Romantika knaba ĝu'.

Gaje kantas en la koro,  
kiam ni kun la pafil'  
mavŝas tra la vasta stepo  
en varmiga la sunbril'.  
Pro l' pafad' kaj kornoludo  
ĝojo estas en l' anim';  
al ĉasisto nekonataj  
estas zorgo kaj ektim'.

trarah, trarah,....  
Pif paf! fumo leviĝas,  
eĥas jen fore de l' pafoj la bru'.  
Pif paf! falu, leporoj!  
Vivu la ĉaso kaj ĝia ĝu'!

Ĝojaj pafoj, ĉasplezuroj,  
vi al mi vidigas jen:  
ĉiujn en Poluj' ĉasistojn  
kun pafilo sur posten'.  
Ĉirkaŭ ni arbaroj kuŝas,  
sonas korn, kaj tamburad'...  
Svarme proksimiĝas grupoj...  
„Bone celu, kamarad'!“  
trarah, trarah,....  
Pif paf! fumo leviĝas,  
eĥas jen fore de l' pafoj la bru'.  
Pif paf! falu, vi Rusoj!  
Boże coś Polskę! De l' Poloj la ĝu'!

El la flandra tradukis  
Jan van Schoor.

\*) El „La Studentoj el Varsovio“.

HENRYK GIELB.

## POLOJ EN ESTONIO

Ok milionoj da Poloj vivas ekster la limoj de Polujo, ĉie, tra la tuta mondo, oni trovas polajn elmigrintojn, kiuj en kelkaj landoj (USONO, Argentino k. a.), nombras kelkcent milojn da loĝantoj. Pasigante kelkajn semajnojn en Estonio, dum aŭgusto nunjara, mi ekinteresiĝis ankaŭ pri la vivo de Poloj en tiu malgranda norda lando.\*)

Kie ajn mi nur estis, en Tallinn, en Tartu, en Narva, ĉu en alia loko mi klopodis interkonatiĝi kun Poloj, ekscii pri iliaj viv-kondiĉoj. Kelkfoje, Poloj mem al mi aliris, rimarkinte polan gazeton en mia mano. Kun kelkaj mi konatiĝis per... Esperanto en la Tallinna „Espero“. Ili estas esperantistoj. Unu fojon mi travivis emocioplenan momenton, tio estis

en Narva. Mi iris al mia konatino kaj ne estis tute certa pri la vojo. Mi alparolis ruslingve iun preteriranton. Sed tiu rigardis min momenton kaj demandis: „sinjoro, ĉu vi estas el Polujo“? Laŭ mia akcento li rekonis, ke mi estas Polo, kaj kiam mi respondis, ke mi loĝas en Warszawa, mia demandito ekscitiĝis. Li estis Polo, naskita en Warszawa, 40 jarojn li jam vivas en Estonio, kiel seruristo li nun laboras en grandaj manufakturo-fabrikaj Krenholm en Narva. Li estas tre kontenta, en Estonio oni ne faras diferencojn pro ies deveno, ĉiuj homoj estas egalaj kaj samrajtaj. Li legis en gazetoj, ke Warszawa estas granda kaj bela urbo, li dezirus iam ĝin viziti...

Similajn respondojn pri la rilato de Estonoj al Poloj en Estonio, mi aŭdis multajn. La Estonoj estas sincera popolo kaj estimas Polujon, la potencon ŝtaton. La maljuna generacio de Poloj en Estonio, vivas ankoraŭ kun rememoroj pri la patrolando kaj ili estas fieraj pri sia poleco. Rilate la junularon, la afero estas iom alia; la junularo troviĝas sub natura proceso de asimilo. Mi diris „natura“ proceso, ĉar tia ĝi estas vere. Oni neniel povas paroli pri devigo, malgraŭ tio, ke la naciisma movado en Estonio, lastatempe fariĝas tre forta kaj malgraŭ tio ke la Poloj en Estonio ne havas kulturalan aŭtonomion. Kulturalan aŭtonomion, tio signifas ŝtatajn lernejojn kun la pola lingvo kaj simile, povas postuli 3000 da civitanoj, kaj la nombro da Poloj en Estonio atingas proksimume 1.500 personojn. Sed la Poloj en Estonio ne sentas mankon de formalaj leĝoj kaj rajtoj. Ne estas konata fakto, ke oni faru al Poloj en Estonio malfacilaĵojn pro lia poleco, kaj oni lin diferencigu de alia estona civitano. Al demando pri la estonteco mi emus respondi, ke verŝajne la Poloj en Estonio neniam atingos 3000 da personoj kaj same neniam atingos kulturalan aŭtonomion. Sed, kiel mi jam substrekis, tiaj formalajtoj ne estas al ili bezonaj kaj ili ne sentas mankon.

Lastatempe la polaj konsulejoj en Estonio komencis kulturalan kaj klerigan laboron polan por la Poloj; kiel kursojn de la pola lingvo, prelegojn pri Polujo k. t. p., sed malgraŭ tio la natura proceso estas tre forta. La pola junularo, vivanta konstante inter la estona, estoniĝas des pli forte, ĉar neniu ĉirkaŭe memorigas la polecon. Estona junulo neniam memorigas al sia pola kunulo alian polecon, nur lin konsideras sambona amiko, kiel ĉiun alian Estonon.

Tiun rilaton al Poloj en Estonio mi observis ĉie, sur ĉiu vivo-kampo, ekonomia, socia ĉu politika. Por tamen doni al miaj observoj pli da aŭtoritateco, mi turnis min al s-ro charge d' affaires Łasiński por intervjuo pri la vivo de Poloj en Estonio:

La Estona Popolo — komencis s-ro Łasiński — estas bonega popolo, kiun oni bedaŭrinde tre malmulte konas ankaŭ ĉe ni en Polujo. La honesteco, sincereco kaj laboremo de la Estonoj povas esti ekzemplo-donaj por multaj aliaj popoloj. Estonio estas malgranda kaj ne riĉa lando, sed bonvolu rigardi ilian mastrumadon kaj la vivo-nivelon de la vastaj popolamasoj. Estonio ne travivis tiom fortan krizon kaj senlaborecon kiel aliaj landoj ankoraŭ nun travivas. La parta senlaboreco en Estonio dum la antaŭaj jaroj estas lastjare likvidita, kaj la kamparo eĉ ne havas sufiĉe da laborfortoj.

Se ni nun esploras la vivon de Poloj en tiu lando, ni nur venos al la samaj rezultoj, kaj ni ne trovos ion specialan en la vivo kaj laboro-kondiĉoj de la Poloj en Estonio. Nur malmulte aliloke ni havas tiom da sinceraj amikoj kiel en Estonio, ĉio alia estos do konsekvenco de tiu rilato al ni.

— Kaj ĉu kultura aŭtonomio ne povus malfaciligi la asimilon de Poloj en Estonio? — mi demandis. —

Nepre ne, ĉar tio ne estas asimilo akcelata aŭ kunhelpata de iu ajn. Neniu Estono estus helpanta al tiu afero, ĝi estas simpla natura proceso de kunvivo de la pola kun la estona junularo, kio konsekvence kaŭzas forgeson de la poleco.

Pro la kaŭzo, ke la Poloj en Estonio estas disigitaj tra la tuta lando, la pola kultur-kleriga laboro ne povas atingi ĉiujn.

Tial do, per sia natura vojo, malrapide, iras la proceso de estoniĝo de la pola junularo en Estonio...

Mi refoje substrekas — aldonis ĉe la fino s-ro Łasiński — ke la Poloj ne povas sin senti malbone inter la estona popolo, kiun vere valoras ekkoni, kaj kiam oni ekkonas la estonan landon kaj popolon ne estas eble ilin ne ekŝati kaj ekami...

Mi vizitis ankaŭ Latvion, Finnlandon kaj Svedujon, ankaŭ tie vivas Poloj, ankaŭ tie mi parolis kun la polaj reprezentantoj ŝtataj, sed pri tio alian fojon, en aparta artikolo.

Henryk Giełb.

\*) En tiu ĉi loko estu al mi permesite esprimi koran dankon al: Ministro de Estonio en Varsovio Hans MARKUS, al Departamento DIREKTORO SAMUL, al Inspektoro SAMARÛTEL — en Tallinn al la Gazetara Fako de la Eksterlanda Ministerio de LATVIO, al Faktestro SEPPÄLÄ kaj Attaché VARTIO-

VARA en Helsinki kaj al s-ro Direktoro Henry LINDBERG en STOCKHOLM — pro la disponigo al mi de senpagaj vojaĝoj fervojaj tra la tutaj landoj kaj pro ebligado al mi kaj helpo ĉe la konaĝo kun la juĝeja kaj mallibereja problemoj en tiuj landoj. Plej kore dankas:  
Henryk Gielb, Warszawa.

DR. LEOPOLD DREHER.

## LINGVA ESPLORO.

En la numero junia de P.E. mi trovis:

„...la popolo opiniis ĉiun perforton... kiel nura romantikismo...“ D. e.: kiel nuran romantikismon, aŭ: „...opiniis nura romantikismo“.

Anst. „lia ĉiu batalo“ pli bona estas: ĉiu lia batalo.

Se oni diras „Vladislao Jagiełło, Julio Słowacki ktp., oni devas diri ankaŭ: Adamo Mickiewicz, ne: Adam Mickiewicz.

Anst. „la funebra eksportado de Warszawa al Kraków“ d. e.: la funebra elportado el Warszawa al Kraków.

Anst. „la regiono... etendas sin“ mi preferas: „etendiĝas“.

Anst. „konsonan'aj finiĝoj“ mi preferas: finaĵoj.

Anst. „vojaĝis al Puck pro retoj“, mi preferas: por retoj. La retoj ne estis la kaŭzo, sed la celo de la Pucka vojaĝo. Simile oni diras: iri al kuracisto por konsilo, ne: pro konsilo, kiel ofte ni legas eĉ en eksterlandaj esp. gazetoj. Alie la frazo impresas, kvazaŭ la konsilo estus la kaŭzo, ne la celo de la iro.

„La ne atendita morto“ devas esti skribata kunligite: la neatendita morto.

Simile: „ruze kaj necedeme“, anst. ruze kaj ne cedeme. Iom alie impresas „ne cedeme“ kaj „necedeme“. „Ne cedeme“ diras kvazaŭ: tiel kaj ne alie!!

„Sindonite al“? Eble pli taŭgas: sin doninte al. (paĝo 4-a de la artikolo de Zawiszanka, linio 2-a desupre).

SKOLTA ANGULO.

## REZOLUCIOJ DE ESPERANTISTAJ GESKOLTOJ.

XIII-a Internacia Konferenco de la Skolta Esperantista Ligo okazinta en Spała la 16-an de julio 1935 konstatas: ke internacia helplingvo Esperanto inter la Skoltaro Tutmonda malrapide, tamen konstante progresas antaŭen,

rezulte de tio rezolucias:

1) rekonante signifon kaj gravecon de la internacia helplingvo Esperanto por skoltaro kiel perilo de interamikeco skolta frateco kaj kiel traduklingvo, lingvo en la turistiko, radjo, poŝto ktp. rezo-

La frazo: „La luktanton en nokto kontraŭ grandego de solecaj meditadoj foje elŝiras el ili subite ne kutima sono“ estas ege malfacile komprenebla por mi. Oni devas almenaŭ tri fojojn tralegi ĝin, por kapti la ĝustan sencon, kiu estas: el la amaso da solecaj meditadoj, kontraŭ kiuj li luktis en malfrua nokto, subite vekas lin nekutima sono.

En vivo de la Marŝalo, d. e. en la vivo de...

Stilzoj — mi ne konas. Ŝajre szczudła?

Kio estas nomo de via patrino? Devas esti: Kio estas la nomo... Sed mi preferas: kiun nomon havas via patrino?

Anst. „li demandis al sia submajstro, kie estis la vaguloj“, d. e. kie estas la vaguloj. Tiu ĉi eraro ne elvenas el sub la plumo de slava esperantisto, ĉar pole oni diras same kiel en Esp.: gdzie są włóczędzy, ne: gdzie byli włóczędzy.

Kvazaŭ por „kompensi“ la ĵusdiritan, sudorientajn Polujanojn (Wsch. Małop.) kronikas:

„Oni aranĝis adiaŭvesperon, enmaniginte al la Ĉe-instruistino belan donacon“.

Ĉu vere nur post kiam oni „enmanigis“ la donacon, oni decidis kaj aranĝis la „adiaŭvesperon“? La frazo devas teksti: enmanigante, sed pli bonstila estus „dum kiu oni enmanigis“.

„Ili helpu laboron de la O. K.“ d. e. ili helpu la laborojn de la O. K.

lucias: starigi fortajn naciajn distriktojn de SEL en kadroj de Landa Skolta Asocio (Ligo) en tiuj landoj, kie estas sufiĉa nombro da esperante parolantaj skoltoj. La fondotaj Distriktoj de SEL ne povas kontraŭstari ĝeneralajn principojn de la Internacia Skolta Kontoro.

2) La Kongreso kun ĝojo akceptas kunlaboron kun Universala Asocio de Blindul-Organizajoj laŭ vera skolta helpemo, por progresigi kaj evoluigi skoltadon por blinduloj en la tuta mondo.

3) La venontaj Tendaroj de SEL okazu prefere en tiuj landoj, de kiu venos oficiala invito de Landa Skolta Asocio (Ligo) por tendari.

4) La Kongreso sendu gratul-telegramojn al Prezidanto de Pola Respubliko prof. Ignacy Mościcki, al ĝvidanto de Pola Skolta Asocio vojevodo dro M. Grażyński, al Ministro de Internaj Aferoj, Z. Kościalkowski kaj al Lordo Baden Povell.

\* \* \*

El la raporto de la Organiza Komitato por la XIII-a Tendaro de Skolta Esp.

Ligo okazinta en Spaña (11—24. VII.) ni citas: „La kunvenojn partoprenis skoltoj esp. 7 nacioj — kune 150 geskoltoj. Salutleteroj envenis el kvin kontinentoj. Honoran Prezidon de la konferencoj akceptis majoro Oskar Selkey (vicprezidanto de la Hungara Skolta Ligo). Esperanto-ekspozicio estis unu el la plej interesaj kaj belaj dum la ĵamboreo. Ĝin vizitis multaj eminentuloj kaj skoltfratoj. Gazetaro diverslanda multon anoncis pri SEL-Tendaro. Speciala Pola Agentejo Telegrafa kaj la plej granda pola ĵurnalo „Ilustrowany Kurjer Codzienny“ multe kaj detale raportis. Ĉi lasta en du grandaj artikoloj (I.K.C. Nr. 110 kaj 204). La tendaron vizitis krom eksterlandaj gastoj ankaŭ multaj gesamideanoj el Polujo, inter aliaj: Prof. dr. O. Bujwid (Kraków), kiu afable partoprenis malferman konferencon, dro A. Święcicki (Garwolin), dr. J. Mędrkiewicz (Lublin), ing. E. Loth (Łódź), S. Sudelík (Koluszki), W. Olszowski (Poznań), red. Gelb kaj J. Zawada (Warszawa), J. Duljas (Radom), Fr. Mikunda (Katowice).

## E N U E

Aŭtuna pluvo senĉese frapetas kontraŭ la fenestro. En la kamentubo plende plorhurlas vento kaj en la ĉambro inside enrampis krepusko, kovrante per sia griza mantelo ĉiujn objektojn. Ili perdis la konturojn, senkoloriĝis, foriĝis ien malproksimen. Horloĝo sur la muro unutone mezuras la vojon al la eterneco, senfineco kaj responde al ĝi dolorige batas la koro. La penso kvazaŭ ri-

gidiĝis en sia osta ŭjo. Ĉu revu, pensi? Pri kiu?... Pri kio?... Ne valoras...

Patefono ĉe la najbaro raŭke ludas la malmodiĝintan tangon:

„Aŭtunaj rozoj velkis jam...“

Gutoj de l' pluvo daŭre eltamburetas siajn melankoliajn, malgajajn melodiojn. Estas malvarme... enue...

J. Dratwer.

## Polaj poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj!

Geografie ni estas najbaroj, tamen ni, latvaj ptt-istoj, en nia fakrevuo preskaŭ nenion legas pri via vivo kaj laboro. La samo certe okazas ĉe vi rilate nian landon. La kaŭzo estas troa malsimileco de niaj nacilingvoj, sed ni ja estas esperantistoj kaj ne sole povas, sed ankaŭ devas uzi Esperanton por reciproka informado, pruvante ankaŭ al tuta ptt-istaro la praktikan valoron de nia internacia lingvo.

Latva fakrevuo „P. t. Dzive“ (P. t.

vivo) jam dum pluraj jaroj favoras Esperanton — enpresis skriban kurson de E-to, enkondukis konstantan E-rubrikon kaj eluzas peresperante ricevitan materialon. Do, konatigu per ĝi ankaŭ vian servfakon kaj vivon, sendante koncernan materialon al k-ĝo Ed. Dance, Valmiera, Latvija — Lotwa. Reciproke mi sendos materialon pri nialanda PTT.

Mia alvoko koncernas ankaŭ gekolegojn en balkanaj landoj.

## PRI „HEROLDO DE ESPERANTO“

„Heroldo de Esperanto“, malgraŭ ke ĝi estas privata propraĵo, estas sendube, grava faktoro en la esperanta movado. La akiritan pozicion „Heroldo“ ŝuldas al

la regula kaj semajna aperado, bona priesperanta informservo kaj varia enhavo. Tiu ĉi ĵurnalo tre bone disvolviĝis kaj eble, kun tempo ĝi fariĝus oficiala or-

gano de nia movado. Sed venis la revolucio kaj la situacio radikale ŝanĝiĝis. Jam tiuj post la unuaj „ekscesoj“ multaj esperantistoj ĉesis abonigi „Heroldon“ kaj eĉ vokis al ĝia bojkoto pro la aperado en Germanujo. En la komenco oni povis supozi, ke tiuj okazintaĵoj havas nur transiran karakteron kaj, kompreneble, ke la redakcio de „Heroldo“ ne povis esti respondeca por ili. Tial multaj esperantistoj restis fidelaj al „Heroldo“. Sed pasis kelkaj jaroj kaj la persekutoj kontraŭ pacaj civitanoj nur pro ilia rasa aparteno ne nur ne ĉesis, sed ili fariĝis tuta sistemo de la reĝimo. Ankaŭ oni legas pri persekutoj kontraŭ aliaj religiaj konfesoj, ne parolante jam pri persekutoj direktataj kontraŭ socialistoj, marksistoj k. s. Esperanta movado en Germanujo estas preskaŭ malpermesita kaj ruinigita. Cetere, kiu rajtos publike konfesi, ke li estas adepto de la lingvo internacia kreita de HEBREO Zamenhof, ja apartenanta al la „malsu-

pera“ raso? En tiaj kondiĉoj aperado de „Heroldo“ en Germanujo ne nur estas fakto netolerebla, sed kompromitiga por la tuta movado. Esperantistaro bezonas tribunon, kie ĝi povus libere sin esprimi, sed tio, ja, estas malebla en la nuna Germanujo. La esperanta movado ne pre bezonas semajnan ĵurnalon, sed oni absolute ne povas konsenti, ke ĝi aperadu en tiaj nenormalaj kondiĉoj. Redakcio de „Heroldo“ havas du alternativon:

aŭ transporti „Heroldon“ en alian landon dum la plej baldaŭa tempo (ni diru ĝis 1-a de januaro 1936) kaj daŭre resti unu el la gravaj koloncj de nia movado aŭ la tutmonda esperantistaro solidare ĉesos abonigi kaj subteni tiun ĉi ĵurnalon, kies aperado en la moderna Germanujo estas granda paradokso.

Isaj Dratwer, Varsovio.

Freta 16/3a

Represo petata.

Polujo.



## POLLANDA KRONIKO



**KRAKÓW.** La aŭtuna „sezono“ komenciĝis per prelego de f-ino Irena Szczepańska s. t. Miaj impresoj de la vojaĝo al Italujo kaj Afriko. La 22.10. prelegis s-ino Marja Szczepańska je temo: „Virina mastrumado en hodiaŭa tempo“. Fine la 29.10. okazis lumbildmontrado de la vojaĝo al Italujo kaj Afriko pere de s-ano Kutscher kun enkonduka parolado de Prof. Dr. Bujwid. Post la prelego okazis lotumado de „Horloĝa Loterio“. La unuan premion (ora horloĝo) gajnis s-o Springer Karol, la duan (arĝenta fontplumo) s-o Świętnicki Michał kaj la trian (arĝenta krajono) s-o Schmidt Karol, ĉiuj el Stanisławów.

**LWÓW.** Vizitis nin la aminda Krakowa samideanino, konata fraŭlino Hermi-na Bertig, plezure salutita.

**ŁÓDŹ.** La 8. X. okazis en Łódź ĝenerala jar-kunveno de Pola Esperanto Asocio kaj elekto de nova estraro, kiu konsistiĝis jene: prez. Franciszek Ender, vicprez. inĝ. Michał Chmieliński, sekretario Adam Smolarek, kasisto Bernard Kepler, membro Stanisław Małek. Nova sidejo de la asocio estas: Łódź, al. Kościuszki 73.

**WILNO.** Post kelkmonata somera libertempo la estraro de TERO decidis denove eklabori. La 20. IX. nia estraro organizis, „glason da teo“ pro la solena

malfermo de nia Esperanta Klubo. Ĉi aranĝo elvokis grandan intereson ĉe Vilnaj ĝesamideanoj. La esp. vesperon ĉeestis ĉ. 100 p. Atentinde estas, ke la malfermon de nia esp. Klubo honoris per sia ĉeesto, s-ano Józef Ŝapiro (ĉefdelegito de U.E.A.) de Białystok. La malferman paroladon havis nia v-prezidanto S. Szyk, kiu salutis ĉiujn gastojn kaj raportis pri esp. fruktlaboro de TERO. (Turista Esperantista Rondo). Prez. dro A. Gurviĉ parolis pri la studo de Esper. historio, literaturo, lingvo ktp. D-ro M. Perelman (de Łomża, nun Vilnano) diris kuraĝigajn vortojn antaŭ nia Esp.-sezono. Kun fortega aplaŭdo parolis s-ano J. Ŝapiro, kiu akcentis la gravecon de esperanto, ĝian disvastiĝon inter diversaj nacioj (kiel ĝuste faris TERO) kaj fine li laŭdis la laboron de TERO en Vilno. Salutis ankaŭ s-ano A. MENHES. S-ano S. Ŝik parolis pri la 27-a E.U.K. en Italujo kaj pri 28-a U. E. Kongreso en Vieno kaj tralegis ricevitaĵojn salutogramojn de profesoro dr. Odo Bujwid (Kraków), Prezidanto de P.E.D. de droj Adam, Zofja kaj Wanda Zamenhof (Varsovio) dr. A. Goldburt (Vilno), H. Steiner (Vieno) Ch. Lapido (Suvalki) k.a. S-ano Subotnik deklamis „Gefratoj kunigu la manojn“ de N. Hovorka, s-ano Lipowski (aktoro). „La obstina Reĝo“ de

M. Nadir, P. Mirański deklamis fabelojn, M. Minkov prelegis pri lia interesa foto-muntado pri esperanto. La esp. blovorkestro ludis antaŭ la malfermo de nia vespero „Esperon“ post la fermo „Taĝigon“. Fine ĉiuj ĝesamideanoj „ĉerpis novan forton“ per teo kaj kuko por povi poste „elegante levi la piedojn“. La tuta esperanta festo faris bonan impreson.

## RADIO.

Depost 15 de oktobro 1935 disaŭdigos ĉiun duan mardon la radiostacioj Kraków kaj Warszawa (eble ankaŭ aliaj) esperanto-prelegojn.

La programo estas jena:

- 15/10. Dr. Jerzy Dobrzycki: Wawel — Pola Panteono.  
 29/10. Emil Mayer: Skolta ĵamboreo en Spała.  
 12/11. Prof. Dr. Odo Bujwid: Impresoj de la Universala E-Kongreso en Italujo.  
 26/11. Prof. Dr. Władysław Kumaniecki: Akiraĵoj de la nova konstitucio en Polujo.  
 10/12. Dyr. Bolesław Walewski: Pola opera verkado.  
 24/12. Kristnaskaj kantoj.

La programojn disaŭdigas la radiostaciojn Warszawa kaj Kraków je la 22.45 horo laŭ MET.

Memoru, samideanoj, ke de subteno via dependas la sorto de Esp. prelegoj en niaj radiostacioj. Diskonigu la programon kaj skribu dankleterojn al **Polskie Radjo, Warszawa.**

Ĉiun merkredon ĉe fino de esperantokurso disaŭdigas radiostacio Wien informojn pri Univ. Kongreso kaj donas respondojn al gravaj demandoj.

\* \* \*

Plezure, franca SOS servo sendas informojn pri la esperantlingvaj radio-elsendoj al ĉiuj samideanoj kaj tutspeciale al la esperantistoj, kiuj povas aŭsi, publikigi en esperantaj, priadiaj kaj regionaj gazetoj, konigi tiujn sciigojn.

Franca SOS-servo estas je la dispono de ĉiuj kaj ĉiam legos ĝoje siajn amikojn. Bonvolu sendi al ĝi gazetojn kaj

revuojn, en kiuj aperis informoj pri la esp. disaŭdigoj. Kompense ĝi sendos sian bultenon.

Radio-Club Esperantiste de France  
**Service S. O. S.**  
 150, Rue Crote-Voye, 150  
 Blanc-Misseron-Quiévrechain (Nord)

### Al ĵurnalistoj, verkistoj kaj poetoj esperantistoj en la tuta mondo.

Preparante eldonon de libro pri la ĵurnalistoj, verkistoj kaj poetoj esperantistoj en la tuta mondo, mi turnas min al la supre menciitaj: mi dezirus, ke en mia libro-almanako ne manku iu ajn, tial mi petas ĉiujn verkantajn esperantlingve pri alsendo de jena materialo:

- 1.) mallonga vivo-priskribo,
- 2.) en kiuj gazetoj vi kunlaboras, (la nomoj de la gazetoj estu en la nacia lingvo kun esperanta klarigo pri la signifo kaj prononco, kun mencio kiel ofte la koncerna gazeto aperas),
- 3.) pri kiaj aferoj vi interesiĝas kaj pri kiaj problemoj vi okupiĝas.
- 4.) la adreso de la gazeto, en kiu vi kunlaboras (preciza adreso),
- 5.) adreso de via loĝejo,
- 6.) unu via persona foto.

Mi petas vin skribi tre legeble, plej volonte per maŝino, lasante larĝan marginon.

**Antoni Pisarski-Woydakowski,**  
 redaktoro  
 de Pola Agentejo Telegrafa  
 en Warszawa.

La materialon mi petas sendi je adreso: Antoni Pisarski-Woydakowski, Warszawa, str. Żłota 38/35, Pollando.  
 P. S.

Mi petas ĉiujn esperantistojn pri aperigo de ĉi tiu komuniko en la esperanta gazetaro kaj en la nacia, kaj sendi al mi pruv.-ekzempl. por statistikaj celoj kaj por propagando de esperanto kaj por esprimi dankon al la koncernaj gazetoj.

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1935, PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO No 406.660.**

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.	ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.
OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—	ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.	KONTO P. K. O. NR. 406.660